

## Editorial : Tres còps

En allemand disèm « De totas bonas causas n'i a tres ». La pausa èra longa, mas ara es aquí, le tresen. Coma vesetz, la presentacion es un pauc trabalhada per díser que vau contunhar.

Se vos voletz mostrar solidari d'aquel moviment, vestiretz la camiseta-« T » que vos mandarai per 80 francs occitans o 12 escuts (indicar la grandor S - XXL). Dessus legiretz « Occitan parla ta lenga / Kaj al la mondo en esperanto ».

Vos desiri un plan bona annada '98 que nos pòrte un congrès agradiu e un pas en avant pels nòstres moviments occitanista e esperantista en collaboracion fruchosa !

## Le Congrès Mondial d'Esperanto

Per çò que concerna le congrès d'esperanto, avança coma cal. Mas i a pas res de revolucionari de contar. Las vòstras idèias e contribucions sul occitan al congrès son çaquela totjorn benvenudas ! E de segur vos esperam amasa a Montpelhièr la prumièra setmana d'agost.

Un videò - Als congresses de las annadas passadas se mostrèron videòs amb un tal succès, que les calguèt tornar mostrar. A Adelaide se mostret un film esmovant d'amistat entre un aborigen e un pichon blanc, jostitolat en Esperanto per la stacion de televista que le creèt. Aquò ven de me balhar l'idèia de far çò meteis a Montpelhièr. N'ai pas encara vist, mas ambe per exemple « Flamenca », « L'orsalhèr » e « Trobadors » sembla qu'avèm de que mostrar ! Mas aquí i a pron rapidament besonh de la vòstra ajuda d'un biais o d'un autre :



## El la redaktejo: Trifoje

En la germana ni diras „De çiuaj bonaj aĵoj estas tri”. Daŭregis, sed nun finfine jen ĝi, la tria. Kiel vi vidas, mi iom prilaboris la prezentadon por diri ke mi pluos.

Por montri vian solidarecon al tiu movado, vestu nian T-ĉemizon, kiun mi sendos al vi por 80 okcitanaj frankoj aŭ 12 ekuoj (indiku la grandecon S - XXL). Sur ĝi vi legos „Occitan parla ta lenga / Kaj al la mondo en esperanto”.

Mi deziras al vi bonegan jaron '98 kiu alportu al ni agrablan kongreson kaj paŝon antaŭen por niaj movadoj okcitanista kaj esperantista en fruktodona kunlaboro!

## La UK

Koncerne la kongreson, la afero glate antaŭeniras. Sed ne estas io revolucia rakontinda. Viaj ideoj kaj kontribuoj rilate la sciigo pri la okcitana tamen daŭre estas bonvenaj! Kaj certe ni atendas vin multnombre en Montpelhièr la unuan semajnon de aŭgusto.

Vidbendo - Dum la lastaj kongresoj ĉiam montriĝis vidbendoj kun tia sukceso ke oni devis plurfoje revidigi ilin. En Adelaide montratis tuŝanta filmo pri amikeco inter aborigeno kaj blankuleto, subtitolita de la ĝin kreinta televidstacio en esperanto. Tio ĵus donis al mi la ideon, same fari en Montpelhièr. Mi nenian vidis, sed ŝajnas ke kun ekzemple „Flamenca”, „L'orsalhèr” kaj „Trobadors” estas io montrinda! Sed tial nun sufiĉe rapide bezonatas via helpo en unu aŭ pliaj kampoj:

Editorial : Tres còps / El la redaktejo: Trifoje .....	1
Le Congrès Mondial d'Esperanto / La UK .....	1
La okcitana - kio estas ĝi? .....	2
Magali de Frederic Mistral .....	3
Indiĝenas d'Australa / Aŭstraliaj indiĝenoj .....	5
Corrièr / Leteroj .....	9
Cortetas / Notoj .....	11
Adreïças en Euròpa / Eŭropaj Adresoj .....	11
Adreïças / Adresoj .....	12

CATALANES

03 FEB 1998  
Sociétés

- Causida del film mai adaptat, ambe polidas exemplas de paraulas occitanas
- Contacte ambe le regissor pels dreits de reproduccion (benlèu per la venta, un cinquantenat d'exemplars a un pretz onest me sèmban possibles, benlèu mai ?) e per l'accès a la còpia d'origina de la mai nauta qualitat.
- Qualqu'un per far la revirada (serà ajudat !) o al mens la transcripcion
- Accés a un bon estudio per jostitolar ambe les capèls que cal per l'esperanto, benlèu l'estudio original o de França 3 Sud « Viure al país »
- *Elekto de la plej konvena filmo, kun belaj ekzemploj de paroloj okcitanaj*
- *Kontaktoj kun la reĝisoro por la kopiaj rajtoj (eble por disvendado, kvindeko da ekzempleroj je honesta prezo ŝajnas al mi eblaj, aŭ eĉ pli?) kaj por aliro al la origina kopio de plej alta kvalito*
- *Iu por traduki (li estos helpata!) aŭ almenaŭ transskribi*
- *Aliro al bona studio por subtitoli kun esperantoĉapeloj, eble la origina studio aŭ tiu de França 3 Sud „Viure al país”*

## La okcitana – kio estas ĝi?

Aquí presenti pels esperantistas la lenga d'òc, son istòria e sa cultura.

*Okcitanujo, jen mondvasse famkonata lando pro sia bonega kuirarto, fromaĝo kaj vino, kaj pro siaj lumplenaj impresiismaj pentraĵoj. Okcitanujo, jen ankaŭ preskaŭ nekonata lando. Ke Provenco (Provença) aŭ Langvedoko (Lengadòc) havas iel apartan lingvon iuj ja malprecize konscias, eĉ ke la dua, kongresa, regionnomo fakte signifas la nomon de tiu lingvo (lingvo d'òc). Sed eĉ la lokanoj tute ne konscias pri la etendo de la lingvoareo kaj ofte eĉ ne pri la lingveco.*

*Komence de la mezepoko la eklezio konstatis ke en multaj regionoj de la iama romia imperio la homoj ĝenerale ne plu kapablis kompreni la latinan, do la liturgiajn tekstojn. Dum la oka jarcentoj estas unuaj tekstoj en la okcitana, unu el la tiel nomataj malaltlatinaj formoj. En la 11a jarcento tiu lingvo estis parolata*

*en la suda duono de la hodiaŭa Francujo, la norda duono de la hodiaŭa katalunaj landoj, la okcidenta duono de la nuna norda Italujo kaj, krom en la nordeto, ĉie en la niatempa „franclingva“ Svisujo.*

*Poste pro manko de centra ŝtato aŭ konscio pri la kuneco, la regiono disfalis en pluraj dialektujoj, kaj tri lingvujoj. La nordo perdis sian okcitanecon, i.a. pro pesto en Peiton-regiono post kiu envenis franclingvanoj en intertempe preskaŭ senpopola lando. La oriento iom italiĝis, dum nur en la sudo okazis ekspansio pro katalunaj konkeroj.*

*Sed unue okazis la ora aĝo de la okcitana kulturo kun la trobadoroj. La unua estis Guilhèm de Peitieu. Ankaŭ sia fama nepino Alienor d'Aquitània, kaj ties filo Ricard Còr de Leon, reĝo de Anglujo poeziis, same kiel ekzemple Marcabrun, Bernat de Ventadorn aŭ Pèire Vidal. De la 11a ĝis la 13a jarcento ili produktis en Eŭropo tute*

*novstilan poezion – la amkanton. Tiun arton ili portis ĝis alta nivelo, tiel ke ĝi disradiis tra Eŭropo. Tia literaturo estis multifaceta, havis diversajn poeziajn formojn, filozofion kaj pensadon pri la lingvo mem.*

*Tiuj trobadoroj laboris por aŭ parte mem estis princoj. Rimarkinde estas ke tio preparis la terenon por la pacama katara religio, kiu venis de antaŭkristanaj maniĥeismaj ideoj survivintaj la romian imperion en Armenujo kaj revenintaj tra Balkano kaj Lombardujo. Tiu religio, kiun toleris aŭ eĉ partoprenis la princoj, estis kristana sed sendependa de la papo kiu pro tiu ordonis la francan reĝon ordigi la landon. Tiu kruele realigis. Post jarcento da urbobruligo kaj inkvizicia amasmurdigo la lando estis franca posedaĵo.*



*Perdinte la subtenon de la nun francdevenaj princoj, la literaturo malpliigis ĝis en la 16a jarcento ĝi ĉesis. Post tio mirinde la homoj tute forgesis pri la trobadoroj, kaj kiam jarcentfine kelke da homoj, kiel Loïs Belaud de la Belaudièra el Ais de Provença o Pèire Godolin el Tolosa, rekomencis skribi okcitane tio okazis per franceca skribmaniero tute malsimila la al aliaj romidaj.*

*Oficiale la lingvoneniiga politiko komencis en 1539 kun la edikto de Vilèrs-Coterests (okcitana vilaĝo!) kiu postulis ke ĉiu skriba dokumento estu en la franca (ĝis tiam en la nordo oni ankoraŭ uzis la latinan). Tamen en la malfacile alireblaj Pireneoj oni primokis tion, plu skribante okcitane ĝis 1660 en Navarra kaj katalune eĉ ĝis 1738 en Russelló. La blazono de la urbo Lyon ankoraŭ nun havas okcitanan devizon.*

*Lastjarcente renaskiĝis la literaturo interalie kun Frederic Mistral kiu kun aliaj aŭtoroj fondis en 1854 tutokcitanan movadon Felibritge, kiu ankoraŭ viglas. Li provis unuigi la lingvon per tutlanda vortarego, „Lou Tresor dou Felibrige.” En 1905 li ricevis Nobel-Premion por sia poezio „Mirelha” (vidu sube).*

*Samjare la „ruĝa” (maldekstrema) Lengadòc ekbolis kontraŭ la koloniismo pariza. La ĉefurbo mobilizis soldatojn kontraŭ la laboristoj kaj vinfaristoj, sed multaj rifuzis pafi. La lokanoj en tiu situacio forte eksentis sian alilingvan identecon. Sed jardekon poste, por paroli kun la kameradoj en la mondmilitaj fosoj, la homoj unuafoje en siaj vivoj bezonis la kompare raŭkan nordan lingvon, kiun de kelkdekoj da jaroj oni devige enkapigis al ili lerneje.*

*Tuj post la milito la Lengadòc-anoj Perbòsc kaj Estieu renovigis la skriban lingvon – ok jarcentojn malantaŭen. Ili revenis al la trobadorepoka skribmaniero aldonante diakritojn por distingi ekzemple ,o' [u] disde ,ò' [o] kaj aliflanke unuigis laŭeble skribmanierojn prononcante inan finan ,-a' laŭregione [a], [o] aŭ [ø]. Alibèrt al kiu oni ofte malpravete atribuas tiun sistemon nun okdekelcente uzatan, perfektigis ĝin en '35.*

*En la dumilita marionetŝtato de Vichy, kiu grandparte samis al Okcitanujo, la germanoj enkondukigis, kvankam ne je efika nivelo, la okcitanan ekzemple kiel lerneja fako. La motivo de diferencigo de la franc-lingva nordo estis evidenta, almenaŭ ĝi ne havis 50 jarojn poste la tristan sekvon kiun samspeca politiko havis antaŭnelonge en Ĉeĥoslovakujo.*

*En '45 fondiĝis Institut d'Estudis Occitans en Tolosa kiel noviga kontraŭpelo al la konservema Felibritge. Ĝi estas hodiaŭ reprezentata en ĉiu okcitana departemento, la vaŭdaj valoj italflanke kaj en Parizo kie pro malriĉeco de kelkaj regionoj loĝas multaj okcitanoj. Vigle ĝi subtenas diversajn agadojn kaj eldonas multajn librojn. Tiujn oni tamen malfacile trovas, ĉar multaj homoj supozas sin nekapablaj legi la lingvon kiun ili neniam lerneje studrajtis.*

*Certan plibonigon, kontraste al la lastjarcenta alvoko instruisten, elradikigi ĉiun lingvon krom unu, oni konstatas. Sed ke entute nur 70 000 lerneĵanoj en 13 miliona popolo studas la lingvon apenaŭ estas sukceso, des pli ke por multaj temas nur pri unu horo po semajno dum la lasta jaro ekzamenprepara. Pli feliĉaj estas la 500 asociaj Calandreta-bazlerneĵanoj, kiuj plene dulingve amuziĝas, tiel senpeze lernante. Baldaŭ sekvos eĉ komence unu, sekve pliaj mezlernejoj.*

*La lingvon jarcentkomence ekskluzive uzitan, oni hodiaŭ apenaŭ plu aŭdas, kvankam duono de la loĝantaro komprenas kaj triono kapablas paroli ĝin. Ofte ĝi jam estis mortdirita vane, tamen la situacio ankoraŭ malfaciliĝas. Ankaŭ kadre de tutmonda vekigo pri tiaj problemoj, homoj ekkonsentas pri sia riĉa heredaĵo. Ni esperu kaj helpu ke la tendenco inversiĝos!*

## Magali de Frederic Mistral

Aquel cant fa partida de « Mirelha », le poema que balhèt le Premi Nobel al fondator del Felibritge. Pareguèt en esperanto dins La Provence Liberée a l'occasion del congrès francés d'esperanto en 1968 a Ais de Provença.

O Magali, ma tant amada,  
 Mete ta tèsta au fenestron !  
 Escota un pauc aquesta aubada  
 De tamborins e de violons.

Tiu kanto estas en „Mirelha”, la poezio kiu donis la Nobel-Premion al la kreinto de l' okcitana movado Felibritge. Ĝi aperis en esperanto en La Provence Liberée okaze de la franca kongreso de 1968a en Ais de Provença.

Ho Magali, amata mia,  
 Montru la kapon ĉe l' fenestr'  
 Aŭskultu nun l' aubadon  
 Jenan de tamburet' kaj violon'

Es plen d'estèla', aperamont,  
L'aura es tombada,  
Mas lis estèlas palliràn  
Quand te veirán

Pas mai que dau murmur di brondas  
De ton aubada ieu fau cas !  
Mai ieu m'en vau dins la mar blonda  
Me far anguiela de rocàs.

O Magali, se tu te fas  
Lo pèis de l'onda  
Ieu, lo pescaire me farai,  
Te pescarai.

O ! Mai se tu te fas pescaire,  
Ti vertolets quand gitaràs,  
Ieu me farai l'aucèu volaire,  
M'envolarai dins li campàs.

O Magali, se tu te fas  
L'aucèu de l'aire,  
Ieu lo caçaire me farai,  
Te caçarai.

I perdigaus, i boscaridas,  
Se vènes tu, calar ti laç  
Ieu me farai l'erba florida  
E m'escondrai dins li pradàs.

O Magali, se tu te fas  
La margarida,  
Ieu l'aiga linda me farai,  
T'arrosarai.

Se tu te fas l'aigueta linda,  
Ieu me farai lo nivolàs,  
E lèu me'n anarai ansinda,  
A l'America, perabàs...

O Magali, se tu t'en vas  
Alin is Indas,  
L'aura de mar ieu me farai,  
Te portarai.

Se tu te fas la marinada,  
Ieu fugirai d'un autre laç,  
Ieu me farai l'escandilhada,  
Dau grand solèu que fond lo glaç.

O Magali, se tu te fas  
La solelhada,  
Lo verd limbert ieu me farai,  
E te beurai.

Se tu te rëndes l'alabrena,  
Que se rescond dins lo bartàs,  
Ieu me rendrai la luna plena,  
Que dins la nuech fai lum i mascs.

O Magali, se tu te fas  
Luna serena,

*Je steloj plenas la êiel',  
Jam vento falis,  
Paliĝos tamen êiu stel',  
vidante vin.*

*Ne pli ol la branĉetmurmuron  
L' aŭbadon vian zorgas mi!  
Foriras mi en la marblondon  
Kaj iĝos mi de l' rok' l' angil'.*

*Ho Magali, se iĝos vi  
La fiŝ' de l' ondo  
Tuj la fiŝisto iĝos mi  
Kaj kaptos vin.*

*Ho! Sed se iĝos vi fiŝisto,  
Jam êe l' ekĵet' de la retar',  
Fariĝos mi fluganta birdo,  
Kaj flugos mi tra la kampar'.*

*Ho Magali, se iĝos vi  
La bird' aera,  
Tuj la ĉasisto iĝos mi,  
Kaj ĉasos vin.*

*Se por perdrik, se por silvio,  
aperos ie via laĉ',  
Fariĝos mi floranta herbo,  
Kaj kaŝos min en la herbej'.*

*Ho Magali, se iĝos vi  
La lekanteto,  
Klarega l' akvo iĝos mi,  
Akvumos vin.*

*Se iĝos vi l' akveto klara,  
Fariĝos mi la griza nub',  
Tiele mi rapide ŝvebos,  
Al Ameriko tute for.*

*Ho Magali, se iros vi  
For al Hindio,  
La mara vent fariĝos mi,  
Kaj portos vin.*

*Se iĝos vi de l' mar' la vento,  
Mi fuĝos plu al nova flank';  
Fariĝos mi la ekbrilado,  
De l' granda sun', glacifandul'.*

*Ho Magali, se iĝos vi  
La sunbrilado,  
Lacerto verda iĝos mi,  
kaj trinkos vin.*

*Se iĝos vi la salamandro,  
Kaj kaŝos vin sub la veprar',  
Fariĝos mi la plena luno,  
Lumanta por la noktfear'.*

*Ho Magali, se iĝos vi  
Serena luno,*

Ieu bèla nèbla me farai,  
T'acaptarai.

Mai se la luna m'enmantèla,  
Tu, per aquò, non me tendr,  
Ieu, bèla ròsa vierginèla,  
M'espandirai dins l'espina.

O Magali, se tu te fas  
La ròsa bèla,  
Lo parpallon ieu me farai,  
Te baisarai.

Vai calinhaire, corre, corre !  
Jamai, jamai, m'agantaràs,  
Ieu la rusca d'un grand rore,  
Me vestirai dins lo bosca.

O Magali, se tu te fas  
L'aubre di morres,  
Ieu lo clòt d'eurre me farai,  
T'embraçarai.

Se me vòls prene a la bracet,  
Ren qu'un vièlh chaine arraparàs...  
Ieu me farai blanca mongeta,  
Dau monastièr dau grand Sant Blas !

O Magali, se tu te fas  
Monja blanqueta,  
Ieu, capelan, confessarai,  
E t'ausirai.

Se dau convent passes li pòrtas,  
Toti li monjas trovaràs,  
Qu'a mon entorn saràn per orta,  
Car en susari me veiràs.

O Magali, se tu te fas  
La paura mòrta,  
Adonc la terra me farai,  
Aquí t'aurai.

Ara comence enfin de creire,  
Que non me parles en risent,  
Vaquí mon anelon de veire,  
Per sobvenença, o bèu jovènt !

O Magali, me fas de bèn !  
Mai, tre te veire,  
Ve lis estèla, o Magali,  
Coma an pallit.

Tuj çefa nubo iĝos mi,  
kaj tegos vin.

Eĉ se la nubo min mantelas,  
Per tio vi ne tenos min,  
Ĉar bela rozo senmakula,  
Ekfloros mi sur densa dorn'.

Ho Magali, se iĝos vi  
La rozo bela,  
La papili' fariĝos mi,  
kaj kisos vin.

Tuj, amserĉulo, kuru, kuru!  
Ne jam, ne jam, min kaptos vi,  
Ĉar per la ŝelo de kverkego,  
Mi vestos min en la densej'.

Ho Magali, se iĝos vi  
Monteta l' arbo,  
Kedera tufo iĝos mi,  
Brakumos vin.

Se volas vi min brakumadi,  
Nur oldan kverkon kaptos vi...  
Fariĝos mi blank-monaĥino,  
de l' monaĥej' de l' sankta Blaz.

Ho Magali, se iĝos vi  
Monaĥineto,  
Konfeson prenos, pastro, mi,  
Kaj aŭdos vin.

Se l' monaĥejon vi eniros,  
La monaĥinojn trovos vi,  
Min diligente prizorgantajn,  
Ĉar mortotuke kuŝos mi.

Ho Magali, se iĝos vi  
Kortaĵo povra,  
La tero tiam iĝos mi,  
Kaj tenos vin.

Finfine, mi komencas kredi,  
Ke vi parolas ne por ŝerc',  
Jen mia la ringet' el vitro,  
Por memorig', ho beljunul'!

Ho Magali, vi ravas min,  
Sed jen rigardu,  
Paliĝas fakte ĉiu stel',  
Vidante vin.

## Indigènas d'Australia

Le congrès universal passat èra una bona occasion de conneisser una cultura remirabla. Es pas vielha de quelques milièrats d'annadas mas de quelques desenats de milièrats ! I a al mens 60000 annadas, benlèu 100000, qu'aribèron en Australia, e se dis que la lor cultura ten encara traches qu'an 40000 annadas.

## Aŭstraliaj indiĝenoj

La lastjara UK en la ruĝa kontinento estis bona okazo por konatiĝi kun mirinda kulturo. Ne kelk-miljaraĝa ĝi estas, sed kelkdek-miljara! Antaŭ almenaŭ 60000 jaroj, eble 100000, ili alvenis Aŭstralion, kaj ilia kulturo laŭdire ankoraŭ havas erojn 40000 jaraĝajn.

De segur èron perfektament adaptats als environs diversas d'aquel país. Probable un fum moriguèron en ensajant pel primièr còp plantas, mas apuèi per totjorn èra dins la memòria comuna que manjar. Plan conegut es le bomerang emplegat a la caça. En mai d'aquò una lança que sembla volar un còp lançat per un bastonet especial (ai vergonha d'aver pas capitat). Per aquò tuèron cangarons, dingòs e fòrça autris bestias.

Coneguèron cada trauc d'aiga, e cada montanha (èra per ieu un teren remirablament variat dins l'outback supozat plat). Cossí diable se soveniguèron sens solament un sistema d'escritura? La clau es le temps somiat que le serp d'arc-en-cèl creèt la terra. Bestias diversas, de còps ambe traches umans, se pasejèron e luchèron, atal creent monts, rius e traucs d'aiga. Es una istòria contunhada a travers le continent, qu'a subretot detalhs particulars a tot endreit.

D'aquò cònton plen d'imaginacion, acompanhats per exemple al nòrd pel didjeridu, l'instrument de vent tradicional (véser exemplars polidament pintats dins la fotò). Atal, conèissent las istòrias, èra possible de trapar son camin, reconèissent una montanha que sembla una bestia, o una blessura cantada, al sèu flanc. La melodia dels cants, solament l'instrument, miralhèron l'amont e l'aval del teren, en accentuant lòcs grèus atals qu'un fòrestant que sap pas la lenga compren un pauquet.

L'istòria ten encara la tjukurpa, la lei que regis la vida sociala, tal que les indigènas viguèron generalament en patz e armonia. La possession existèt pas, levant benlèu le pretexte mai grèu de discòrd. Tascas de femnas e òmmes èron claramen partigats, meme pas coneguts dels autris, e totis que demandèri èron d'accòrds, que la mistèria resultanta ligava les sexes fòrtament.

Un fum d'afars e de lòcs son mai o mens sants per de rasons çaquela plan praticas. Se per exemple un trauc d'aiga l'es per de rasons del temps somiat, segon nòstre comprensió de blancs s'agis simplament de conservacion de la qualitat d'aiga a beure per una interdiccion de banh. S'es pas permesat de tuar un serp que mordiguèt es solament per pas perdre temps plan bezonat per sonhar, autrament òm pòt morir. Autris son tament sants que nautris blancs sábon pas res d'aquò.

Jovents aprenènon tot aquò de la menina o del pepin

*Kompreneble ili perfekte adaptiĝis al la ege variaj vivmedioj tieaj. Verŝajne multaj mortis unuajfoje provinte venenajn plantojn, sed poste oni por ĉiam memoris kiel manĝi. Fama estas la bumerango uzita en ĉasado apud maldika lanco kvazaŭ fluganta post lerta ĵeto pere de speciala bastoneto (mi hontige malsukcesis). Per tio ili ĉasis kangaruojn, dingojn kaj multajn aliajn bestojn.*

*Ili konis ĉiun akvotruon, kaj ĉiun monton (estas por mi mirige varia tereno en la supozite plata forforejo). Kiel diable ili memoris tion, eĉ sen skribosistemo? La ŝlosilo estas la sonĝata pratempo kiam la ĉielarka serpento kreis la teron.*

*Diversaj bestoj, parte kun homaj ecoj, vagis kaj luktis, tiel kreante montojn, riverojn kaj akvotruojn. Temas pri tutkontinente kontinua historiario, kiu ĉie havas precipe lokajn detalojn.*


*Pri tiuj okazaĵoj oni imagoplene rakontas kaj kantas akompanata ekzemple en la nordo de didjeridu, la tradicia blovinstrumento duonnaturan (vidu bele pentritajn ekzemplerojn en la foto). Tiel, konante la historiojn, oni povas trovi sian vojon, rekonante bestsimilan monton, aŭ vundon en ĝia flanko prikantitan. La melodio de la kantoj, de la nura instrumento eĉ, speguligas la suprenkaj subenirado laŭ la tereno akcentante gravajn lokojn tiel ke eĉ alilingva fremdulo komprenetas.*

*La historioj ankaŭ enhavas la tjukurpa, la leĝon kiu regas la socian vivon, tiel ke la indiĝenoj ĝenerale pace kaj harmonie kunvivis. Posedo ne ekzistis, forigante eble la plej gravan pretekston kvereli. Taskoj de virinoj kaj viroj estas klare dispartigitaj, eĉ nekonataj de la alia, kaj ĉiuj kiuj menciis tion, kunsentis ke la*

*rezultanta mistereco forte kunligas la seksojn.*

*Multaj aferoj kaj lokoj estas sanktaj diversgrade pro tialoj praktikaj. Se ekzemple akvotruo estas tia pro iaj sonĝaj kialoj, laŭ blankula kompreno simple temas pri konservado de la trinkkvalito per banmalpermeso. Se oni ne rajtas mortigi serpenton kiu ĵus mordis onin, estas simple ĉar oni perdis tempon necesegan por kuracado, alikaze oni mem mortus. Aliaj estas tiel sanktaj ke blankuloj entute nenion scias pri ili.*

*Ĉion ĉi lernas la geknaboj de la samsekxa avo*



del metèis sexe pendent que les parents trabàlhon. Un sistema qu'estona remet oralament tot. Les australians se brèmban del temps que l'interior del continent èra una granda mar. L'examen que balha le dreit de tot saber es l'iniciacion, que per exemple un atjat de detz ans se deu provar en susvivant sol tres meses, susportant una lança a travers la camba o quicòm coma aquò. Le qu'ariba pas serà tuat – mantener la vida d'un incapable es una carga tròp pesuga, e poirià endangerar la tribut tota. La *tjukurpa* es crusela mas absolutement justa.

**La catastròfa** – Un autre afar crusel mas pas gaire juste comencèt abans dos cent ans – venguèt la catastròfa blanca. Òmes qu'aguèron pas l'intencion de se josmetre al la *tjukurpa*, que çaquela òm poguèt pas punir qu'aguèron bastons que tuèron a distança. Pretendent que le país èra a degús prenguèron zònas imensas per levar motons. Generalament bestias d'elevatge d'euròpa domatgèron grevament le país.

Les indigènas se retirèron, sovent aprèp luchas sanglantas. Fòrça moriguèron encara perque coneissèron pas cap de plantas contra las malautias nòvas. Mai grèu èra le còr romput car avian perdut lor país que les istòrias n'èron lor identitat. Aital les Tasmanians dispariguèron completament. Èran gaire considerats òmes. En desencana parciala, me cal diser qu'al temps passat la vasta majoritat dels blancs vesèt pas jamai un australian d'origina. Aquèlis èran interdiches dins las vilas – dins un dels païses mai urbanisats del monde.

Maites se fasquèron embarrar, benlèu ambe bonas intencions, en missions religiosas. De segur aquí calguèt parlar anglès (o de còps autras lengas europèas) o doblidar lors costumats. Malgrat un lotjament e un noiridura aimablement oferts, lor calguèt trabalhassar pel sol amor del dieu estranh. Dezenats de milièrs de mainatges èran preses dels lors parents e integrats dins familhas blancas per una bona adaptacion. Sovent an jamai revist la lor familha, e un grand nombre an la vida roïnada en rason dels abuses diverses.

Fòrça blancs – benlèu la mitat – an encara un sentit maissant sus aquel tema. Un òme que li demendèri le camin d'un restaurant dich indigèna, s'en anèt furiós disant qu'èra pas un aborigèna. Dins un país fièr de sa cosina internacionala e variada sembla que i a pas un restaurant tradicional. Encara las ingredienças localas son gaire emplegats.

**Le cambiament** – En 1967 un dels rars referendums que capitèt, balhèt als aujòls la ciutadinat. La politica d'Australia Blanca tombèt dins las annadas se-

– la gepatroj dume laboras. Miriga sistemo kiu de dekmiloj da jaroj transdonas perbuŝe ĉion. Ili eĉ memoras kiam en la kontinentmezo esti ankoraŭ vasta marego. La ekzameno kiu rajtigas scii pri la sanktaĵoj estas la inicado, kie ekzemple dekjarulo devas sin pruvi vivtenante sin sole dum tri monatoj, elportante trapikon de la gambo per lanco aŭ io tia. Malsukceso signifos mortigon – la ŝarĝo vivteni nekapablulon estus tro peza kaj povus endanĝerigi tutan tribon. La tjukurpa estas kruela sed absolute justa.

**La katastrofo** – Alia kruela sed maljustega afero komencis antaŭ ducent dek jaroj – alvenis definitive la blanka katastrofo. Homoj kiuj tute ne intencis submetiĝi al la tjukurpa, kiujn oni tamen ne povis puni ĉar ili havis perdistance mortigajn laŭtajn bastonojn. Pretendante ke la lando estis nenies ili prenis kion ajn ili volis, vastegajn areojn por ŝafbredado. Ĝenerale eŭropdevenaj farmbestoj grave damaĝis kaj plu as la landon.

La indiĝenoj, ofte post sangaj bataloj, retiriĝis. Multaj eĉ tiam mortis pro malsanoj kontraŭ kiuj ili ne konis kuracon. Pli grava estis korrompo ĉar ili perdis sian teron per kies historioj ili fakte difinis sian identecon. Tiel komplete formortis la tasmanianoj. Homojn oni apenaŭ konsideris ilin. Por parta senkulpigo mi diru ke blankuloj plejparte en antaŭaj tempoj neniam vidis praaŭstralianojn al kiuj estis malpermesite eniri urbojn – en unu el la plej urbigitaj landoj tutmonde.

Multaj estis enigitaĵ, kun eble bonfara intenco, en religiaj misiejoj. Kompreneble ili tie parolu angle (aŭ laŭdevene alian eŭropan lingvon) kaj tute forgesu siajn kutimojn. Kvankam ili ja estis afable loĝataj kaj nutritaj, ili devis laboregi por la nura amo de la fremda dio. Dekmiloj da infanoj estis forprenitaj de siaj gepatroj kaj integrataj al blankulaj familioj por adaptigi ilin. Multaj neniam revidis la familion, kaj granda nombro aĉuliĝis pro evidenta diversa misuzo.

Multaj blankuloj – eble la duono – ankoraŭ havas malbonan sintenon al tiu temo. Viro, kiun mi vojdemandis pri laŭdire indiĝena restoracio, foriris blekante „Mi ne estas aborigeno”. En lando kie oni fieras pri multkultura kuirarto ŝajne ne estas tradicia aŭstralia restoracio, eĉ lokajn ingrediencojn oni malmulte uzas.

**La ŝanĝo** – En 1967a unu el la malmultaj sukcesintaj referendumoj donis al prauloj plenan civitancon. La politiko de Blankula Aŭstralio

tanta e les òmes retrapèron un sentit de valor de lor identitat. Coneguèri metèis òmes que semblan blancs, per exemple un quart indigènas, qu'an pas vergonha de se diser aborigènas iniciats.

L'art original australian, instruments e musica, subretot de David HUDSON (òc, totis an un nom anglés oficial) son en venta dins tota botica toristica. Nacionalament le grop musicaire Yothu Yindi, que mescla cants tradicionals ambe moderns a influencias tradicionals, agrada plan.

Dins sos reservats, ont les blancs pòdon pas aisidament dintrar, e dins las comunas ont demòran amasa, an le dreit d'aplicar entre elis lors leis. Le jutjament de 1992

que le país èra pas a digús avans fusquet un chòc. Implica que tota la presa de terra èra pas justa. Bazat sus aquò, ara an la possibilitat, provant qu'un lòc lor es sant, de le recuparar. Mai conegut es la remission de Uluru, le famós rocás roge del centrè e de Kata Tjuta a costat. En cooperacion ambè les parcs nacionals ara le pòble Anangu le gèra.

En totala les indigènas an ja recuparat 12 porcents del país. Aital òm pausèt una data limita per pausar

sos aplicacions. Aquò's un problem per las femnas que pòdon contar lors istòrias santas sonque a autras femnas – e le govern es mai que mai masclè. Les accions de las companhias de minas e de petròli son una vergonha. Fan de tot per forçar aborigènas de senhar permissions per explèitar e finalament destrusir aquelas regions coma n'an enveja.

Ara le govern vòl vertadièrament ajudar, mas a pas tròp d'idèias. Subretot balha monedas en totas direccions. Evidentament aquò balha pas enveja de trabalhar e buta fòrça òmes a l'alcoolisma. Ensàjon d'educar les indigènas, mas de còps las metodas son pas gaire adaptadas. Una anecdòta : Dins una reserva del nòrd, se òm demanda teoricament « Se as detz dolars e te crompas de beure per dos, quant te tornarà ? » la responsa es a l'asard. Mas dins la meteissa situacion practica le sap

en la sekvintaj jaroj falis kaj la homoj reakiris fieron pro sian identeco. Eĉ blankŝajnajn homojn nur kvaronindiĝenajn, kiuj senhonte proklamas sin iniciitajn aborigenojn, mi trafis.

Origina aŭstralia arto, muzikinstrumentoj kaj muziko, precipe de David HUDSON (jes, ĉiuj havas oficiale anglan nomon) vendatas en ĉiu turismovendejo. Dume enlande la muzikgrupo Yothu Yindi, kiu miksas tradiciajn kantojn kun modernaj tradiciinfluatj, estas ŝatata.

Ili havas la rajton en siaj rezervejoj, kie blankuloj ne facile rajtas eniri, kaj en la komunumoj kie multaj loĝas, apliki inter si la propran leĝon.

Tondre venis en 1992a altkortuma decido ke la lando fakte ne estintis nenies, kio implikas ke la tuta landpreno estis maljusta. Surbaze de tio ili nun havas la eblecon pruvinte la sanktecon de loko reakiri ĝin. Plej konata estas la redono de Uluru, la turismofama ruĝa rokego en la mezo, kaj de apuda Kata Tjuta. Kunlabore kun la naciparka agentejo la Anangu popolo nun mem prizorgas ĝin. Entute indiĝenoj jam reakiris 12 elcentojn de la tuta lando, tiel ke oni nun starigis limdaton por aplikado al land-

redono. Tio estas problemo por la virinoj kiuj povas rakonti siajn sanktajn historiojn nur al aliaj virinoj – kaj la registaro estas plejparte viriĉa. Plej aĉa estas la sinteno de minejaj kaj naftaj firmaoj kiuj ĉiel premas iujn ajn aborigenojn subskribi, tiel ke ili plu povas laŭvole ekspluati kaj ofte detruji tiujn monhavigajn regionojn.

La registaro nun vere volas helpi, tamen estas iom senidea. Plejparte ili sencele disdonas multe da mono, kio malincitas labori kaj alkoholigas multajn. Ili provegas edukadi la indiĝenojn, tamen kelkloke la metodoj estas tute neadaptitaj. Anekdotte nordaj enrezervejaj junuloj tute hazarde respondas al teoria demando kiel „Se vi havus dek dolarojn kaj aĉetus trinkaĵon por du, kiom vi rericevos?“ kvankam en la sama praktika situa-





plan plan. Cossí trachar un biais de pensar tament estranh per nautris ?

**Las lengas** – Occitanistas coma esperantistas de segur s'interésson a la situacion linguística. I a dos sègles 700 tributs parlèron 250 lengas (fonts varian de 200 a 300). Son de qualques familhas de lengas parents entre elis mas ambe cap d'autre lenga del monde. Unas an desenats de dialectes, autris an pas solament un centenat de parlaires. Dins aquèla situacion i aviá pron òmes que sabèron cinc lengas.

Auèi i a encara 100 lengas. I a sentits diferents a l'envers de las lengas. Qualques tributs refúsan d'ensènar la lenga als blancs, e en consequéncia la dintrada de la lenga a l'escòla. Aital se protecton lors istòrias del temps somiat, que ténon tot çò qu'òm pòt saber sus elis, la sola causa que lor demòra. Autris acúlhan aquò ambe jòia, acceptan tanben que les joves blancs aprènon la lenga. Un vintenat de lengas son ensenhats a l'escòla. Me sembla pas un asard qu'es la quantitat suspausada viva aprèp una generacion.

Amb aquelas lengas dins un res de 200 annadas desapareguèt un saber vielhàs imens. Per astre es pas totjorn la fin perque un centenat de lengas fusquèt estudiat. Segon la comprensió d'al mens un pòble, les Kaurna de la vila del congrès mondial d'esperanto, Adelaide, la lenga dormiguèt simplament. Per escrituras vielhas dels blancs, e en estudiant las reglas de passatge fonetic de lengas vesinas, fusquet recreada e modernizada. Es ensenhada a l'escòla e unes mots son ja passats a l'inglés dels parents.

Veirèm se es possible aital de far viure lengas evolucionant tament viste que una revirada de la bibla vièlha de cent ans, en una lenga del nòrd-orient, Tjapukaj, se compren pas mai auèi. De còps dins la carrièra ausiguèri sons estranhs e tanpauç l'inglés criplat de unes aborigènas èra pas gaire de bon comprene e evidentament pas la lenga quotidiana (çaquelà *strine*, l'inglés d'Australia es pas terrible coma pretendon fòrça europèus). D'autre costat dins las quitas centras de cultura ausiguèri sonque l'inglés dels aborigènas. Demandat sus aquò me respondèron que cal parlar la lenga sonque a l'ostal, que l'autre ven d'un pòble autre (mas vesin) que le fraire (probable qualqu'un del tribut) comença solament d'aprene. Al mens comença !

## Corrièr

*Estimata samideano,*

*Antaü çio mi şuldas koran dankon al vi pro la afabla kaj spontana sendo de la bulteno esperanto okcitana kiun vi eldonas.*

*cio ili bonege scias tion. Kiel trakti tiom fremdan pensmanieron?*

**La lingvoj** – Okcitanistojn same kiel esperantistojn kompreneble interesas la lingva flanko. Antaü du jarcentoj 700 triboj parolis 250 lingvojn (laŭfonte 200 ĝis 300) el pluraj lingvofamilioj parencaj inter si, sed kun neniu alia lingvo. Kelkaj havis siaflanke dekojn da dialektoj dum aliaj parolatis de malpli ol 100 homoj. Kvinlingvuloj abundetis en tia ĉirkaŭaĵo.

Hodiaŭ plu vivas 100 inter tiuj lingvoj. Ekzistas malsamaj sintenoj al ili. Kelkaj triboj entute rifuzas instrui la lingvon al blankuloj, kaj konsekvence la environ de tiuj lingvoj en lernejoj. Tiel ili protektiĝas kontraŭ la dissciigo de iliaj songtempaj historioj, kiuj enhavas ĉion sciendan pri ili, la sola aĵo kiun ili ankoraŭ havas. Aliaj bonvenigas tion, eĉ akceptante ke blankidoj lernu la lingvon. Dudek lingvoj estas instruataj lerneje, la sama kvanto kiun oni kredas plu vivonta post unu generacio.

Kun tiuj lingvoj en nur 200 jaroj malaperis sciigo malnovega. Feliĉe ne ĉiam tio devas signifi la finon, ĉar centon da lingvoj oni pristudis. Laŭ la kompreno de almenaŭ unu popolo, la Kaurna de la kongresa urbo Adelaide, la lingvo nur dormis. Pere de malnovaj skribaĵoj blankulaj, kaj studante la fonetikajn transirajn regulojn al la najbaraj lingvoj, oni rekreis kaj modernigis ĝin kaj instruas ĝin lerneje. Kelkaj vortoj jam eniris la anglan de la gepatroj.

Ĉu tiel oni povas vivi lingvojn tiom evoluemajn, ke centjaran bibliotradukon en la nordorienta Tjapukaj homoj hodiaŭ ne plu komprenas, montros la tempo. Kelkloke en la strato mi aŭdis strangajn sonojn kaj eĉ nur malfacile komprenis iujn kiuj parolis al mi kriplan aborigenanglan aŭdeble ne ties ĉiutagan (dum *strine*, la aŭstralangla, tute ne estas tiom terura kiel eŭropanoj pretendas). Dume aliflanke eĉ en kulturcentroj de aborigenoj mi aŭdis nur la anglan. Demandite pri tio ili respondis, ke oni parolu la lingvon nur hejme, ke homoj venas de malsamaj (kvankam najbaraj) triboj aŭ ke la frato (t.e. verŝajne iu samtribano) nur nun komencas lerni la lingvon. Almenaŭ li komencas!

## Leteroj

*Mi legis ĝin, almenaŭ la parton en esperanto, kun intereso sed mi tuj konfesas ke mi ne intencas ĝin aboni. Se ĝi estus poŝtstampita el Tolosa, Montalban, Montpelhièr aŭ Perpinjano, Avinjono, mi komprenus, sed el Frankfurto? La ĝemela urbo de mia naskiĝurbo Liono, ja mi ne komprenas, eĉ malaprobas kaj ne aplaŭdas. Ja plej unue la etnaj lingvoj devas agadi en siaj geografiaj kadroj; regionaj se ili estas regionaj, naciaj se ili estas naciaj. Por mi, uzado de la okcitana en Germanio estas tute monstra kiel uzado de la angla (aŭ de la franca) en Rusio aŭ en Japanio. Tia uzado povas esti la fakto nur de frivolaj historiaj, folkloraj eventoj. Ofte la „grandajn” lingvojn oni akuzas forte pro imperiismo kaj la okcitana estas tia kiam ĝi preterpasas la linion La Rochelle-Grenoblo.*

*Kompense se vi penus imiti, eĉ sekvi la laŭdindan agadon de miaj amikoj Sabina kaj Kristiano (N.d.l.r.: kiu organizas laŭ kunsenditaj folioj kongresojn en Platdiĉujo), mi tiam, per uzo samtempe de la germana en Germanio kaj de esperanto (ĉies lingvo) mi tute ne ŝparus miajn komplimentojn.*

*Esperante ne ofendi vin per tiuj iom severaj vortoj mi opinias ke ĝuste estas la nocio ĉio en sia tempo oportuna kaj en la ĝusta loko.*

*mi sendas al vi miajn plej samideanajn salutojn*

R. COLNEY, Gap (05)

N.d.l.r. : L'autor que sembla pas ostil al occitan, se planh çaquela qu'escrivi en occitan aquí a Frankfurt. De fait es radicalament opausat a l'emplec d'una lenga fòra le sèu país. M'atrasta enormament de véser un esperantista tan imperialista qu'ensag de limitar las lengas a un encastre geografic plan limitat. Urosament me sembla que la vasta majoritat vei modestament l'idèia de la lenga segonda coma una possibilitat polida per l'umanitat e non pas coma restriccion de las autras lengas al profit del sol esperanto. Aquò's l'idèia del Manifest de Praga, adoptat pel congrès mondial d'esperanto en '96. Alavetz soi liure e pas un samideano d'aquel absolutista.

N.d.l.r.: La aŭtoro ja ne ŝajnas malamika al la okcitana. Sed min malfeliĉegigas multe vidi ke esperantisto povas esti tiel imperiisma ke li provas limiti la uzadon de lingvoj al limigita geografia kadro. Feliĉe ŝajnas al mi ke la plejmultego vidas modeste la ideon pri la dua lingvo kiel bela ebleco por la homaro kaj ne kiel limigo de la aliaj lingvoj profite al la nura esperanto. Jen la ideo de la Manifesto de Prago, adoptita per la UK en '96. Mi estas libera kaj do ne samideano de tia absolutisto!

*Kara kunesperantista, okcitanentuziasmita amiko!*

*Leginte vian dulingvan originalan EsperantOC-kurieron, mi impresiĝis per via arda plenentuziasmo pri la okcitana, krome de la esperanta. Unua rezulto de ĉi-tio: mia senhezita akiro de via T-ĉemizo (kion mi jam publikvideble metos dum mia vizito ĉi-septembre en sud-Francio); dua rezulto: mia promeso esti unu de viaj unuaj ĉeestontoj dum viaj okcitanlingvo-kursoj.)*

*Vi vekis en mi la dormantan okcitanlingvan emon, kion mi ekhavis dum universitatkomencaj jaroj. Mi devis studi la malnovfrancan kaj romanistementulo kondukis enkondukkurson en la malnovprovencan. Do, tutlogike, mi interesiĝis pri la novprovenca, havinte regulajn okazojn viziti la departmenton Var. Hontege mi devas konfesi ke mi neniam serioze studis verkojn kiel ekz. „Grammaire Provençale“, la dulingvan Mistralan provencan naciepopeon „Mirejo“. Eĉ la katenantan tri-lingvan okcitanan vortaron de Taupiac mi neklarigeble nur trafolumis. Vi kaj la laŭ EsperantOC-informoj planitaj prelegoj remotivigis min vekkisi „la belle au bois dormant“-an okcitanan. Dankon al vi pro tio.*

*Mi aldonos la monaton „januaro“ de laŭ mi multinteresege parte franclingva, parte provenclingva, ne nur filologrilate grava enhavriĉa kalendaro, kiun vi eble konas. Jese forĵetu la foliojn; nee, mi gratulos min mem, estinte prezentanta al vi, okcitanelstarulo, etan viaparte studmeritindan eldonadon novprovencan. Do, ĝis Montpeliero. Por la intertempo mi deziras al vi kaj memkompreneble al via „filha plan aimbla“ ĉion bonegan.*

*Via*

Dr. Lothar MAHN, Rottweil (D)

N.d.l.r. : Que siagui un eminent occitan es als istorians a decidir dins un avenidor luènh. Mas le calandrièr « Semanié provençau e di país d'o » que l'amic me fa conèisser, es plan fait. Cada setmana i es presentada

N.d.l.r.: Ĉu mi estas okcitanelstarulo, decidu la historiistoj en fora estonteco. Sed la kalendaro „Semanié provençau e di país d'o“, kiun konigas al mi l' amiko, estas bone farita. Ĉiu semaj-

ambe nom del jorn, dels sants e un provèrbi o un fait interessent en occitan (grafia mistralenca). Sovent i a mai o mens de revirada e de clarificacion francimanda. Le tot torna alentorn d'un tema, per exemple en '94 èra l'oliva e son òli tipicament miègterranc.

*no estas prezentata kun tagnomo, sanktulnomoj kaj proverbo aŭ interesaĵo en la okcitana (mistrala skribmaniero). Ofte kun estas pli malpli da traduko kaj klarigoj franclingvaj. Ĉio ĉi ĉirkaŭas temon, ekzemple en '94 estis la oliva kaj sia oleo tipe mediteranea.*

### *Kara lingvamiko!*

*Ni estas kampara asocio sed ni volas esti komprenemaj pri la tuta mondo. Nun, nur mi komprenas esperanton kaj iuj aliaj uloj havas pasivan konon pri okcitana lingvo.*

*Dum la venonta jaro, ni intencas instrui intense esperanton al grupo de dek junulaj geplenkreskuloj do ili kapablos partopreni la kongreson kiel helpantoj. Dum la sekvontaj jaroj ni esperas instrui aliajn ulojn pri aliaj lingvoj, inkluzive la okcitanan, se ni trovos malkostajn sed bonajn instruistojn.*

*Ni dezirus ricevi viajn bultenojn, kaj esperas povi informi vin pri la grupoprogreso.*

*Lingvamike*

Joan-Claudi ROGET, Creissan

## Cortetas

**L'ESPERANTO, qu'es aquò ?** – Aquì le titòl d'un papièr polit e plan eschich qu'editon amassa JeunEsPERANTO e TEJO, la joinesa esperantista mondiala. Amb un paragraf pels punts « Es una lenga – Neutrala e internacionala – Plan aisida – Per qué te pòd servir l'esperanto ? – Per aver d'amics – Per participar a d'amassadas – Per conéisser – Consí aprene l'esperanto – Corses – Consí prene contacte » explica plan l'essencial de la causa en occitan. Existís tanben dins autras lengas minorisadas.

**L'Occitane** – Vist a Cairns, Australia ! S'agis d'un magasin que s'i véndon sonque sabons e perfums naturals d'aquela marca, feitas sense provaments sus bèstias. La filha que i trabalha saupièt pas res d'aquel país. Mas le papafar amb una fotò de lavandièra provençala madura, que me balhèt ne parla e de la sieuna lenga tanben. Quin ambassador enjoiant !


## Adreïças en Euròpa

En Euròpa segon les païses i a un fum de formats d'adreïças : pichon nom avans o aprèp le nom de familha, numerò d'ostal avans o aprèp la carrièra, còdi postal de tres a sièis chifras, o ambe letras, o ambe un segond numerò aprèp la vila... Malaürosament l'Union Europèa a pas solament de sistema unificat pel còdi postal.

Mas subretot çò que geina dins una Euròpa que ven una, es le besonh d'ajustar le nom del país del moment qu'òm manda a l'« estrangier ». Es per aquò, que ja dempuèi fôrça annadas las pòstas d'Euròpa se son entendudas sus una normalisacion que foncciona tant a l'interior d'un

## Notoj

**ESPERANTO, kio ĝi estas?** – Jen la titolo de papero kiun kuneditas la franca esperanto junularo JeunEsPERANTO kaj TEJO. Ĝi ankaŭ ekzistas en aliaj malplimultecaj lingvoj.



**L'Occitane** – Vidite en Cairns, Australio! Temas pri vendejo kie nur aĉetablas naturaj savonoj kaj parfumoj de tiu marko, faritaj sen bestoprovoj. La knabino kiu tie laboras nenion sciis pri tiu lando, sed la varbfolio kun foto de provenca lavandejo kiun ŝi donis al mi parolas pri ĝi kaj ĝia lingvo. Kia ĝojiga ambasadoro!

## Eŭropaj Adresoj

En Eŭropo laŭ la landoj ni havas multe da adresformatoj: nomo antaŭ aŭ post la familia nomo, domnumero antaŭ aŭ post strato, poŝtkodo de tri ĝis ses ĉiferoj, aŭ kun leteroj, aŭ kun dua numero post la urbo... Malfeliĉe la Eŭropa Unio eĉ ne havas unuecan poŝtkodan sistemon.

Sed antaŭ ĉio, kio ĝenas en kunkreskanta Eŭropo estas la bezono indiki la landnomon se oni skribas „eksterlanden“. Estas pro tio, ke jam antaŭ multaj jaroj la eŭropaj poŝtoj interkonsentiĝis pri normigo kiu funkcias same enlande ke je eŭropa

país qu'al nivèl europeu. Sufis d'ajustar avans le còdi postal del país l'indicatiu internacional del país conegut dels autòs, seguit d'un turet.

Malastrosament les franceses conéisson pauc aquel sistema. E pron sovent les que sàbon – sovent les esperantistas qu'an fòrça contactes a l'estrangièr – s'engànhon en pensent que s'agís del còdi ISO. Atal indícon FR- al lòc de F-, e se le paure postièr a l'estrangièr reconeis pas la vila o le còdi a cinc chifras, la letra partirà coma indicat a las islas faroe, pichona region autonòma del Danmarc amb una lenga germanica al nòrd de l'Escòssia, ambe aquí benlèu 50% de chança de contunhar en França.

Aquel sistema es pas complet, i a de païses de l'est que máncon e tanben l'Ingleterra per se distanciar e benlèu perqué ten un sistema de letras que vénon aprèp la vila. Mas l'experiènça mòstra qu'òm pòt emplegar aquel biais d'escriure a l'Euròpa tota. Aquí qualques exemples de la nòstra membralha :

AND-Andorra la Vella, B-1050 Bruxelles, CH-2301 La Chaux de Fonds, D-60326 Frankfurt, E-25530 Vielha, F-34000 Montpelhièr, I-20131 Milano, L-5682 Dalheim & NL-3015 BJ Rotterdam

## Adreïças

### JeunEsPERANTO

4bis rue de la Cerisaie  
F-75004 Paris  
0033/1/42.78.68.86

### Cairefòrc Arnaut-Bernat

1 carrièra de l'ironde  
rue de l'hirondelle  
F-31000 Tolosa  
0033/5/61.23.58.55

## Adresoj

### L'Occitane S.A.

BP 307 - ZI Sant Maurici  
F-04103 Manòsca

### Semanié prouvençau e di país d'o

Paul TACUSSEL  
carrièra de Balha  
rue de Baille  
F-13005 Marselha  
0033/4/91.47.72.06

## EsperantOC

ISSN 1432-7147

Malhum / TTT:

<http://www.k.shuttle.de/fs1003/EsperantOC>

Redactor / Redaktisto: Daniel PFEIFFER

Münsterer Straße 5

D-60326 Frankfurt am Main

0049/69/73 66 50

Fax / Telekopio: 0049/69/7588-2389

Daniel.Pfeiffer@START.de

Aquò es le butletin de l'associacion informala del meteis nom. Pareis irregularament en fonccion dels articles qu'escrivetz. Les autors parèisson dins lor dialecte. Son pas pagats. Les articles senhats per un nom represènton pas forçadament l'opinion de l'associacion. Tota partida pòt estre republicada ambe una indicacion de l'origina. Le contengut de l'edicion malhum es identic. **Fasètz connèisser e circular le vòstre butletin le mai possible !**

*Tio-çi estas la informilo de la samnoma neformala asocio. Ĝi publikigás neregule laŭ la artikoloj, kiujn*

*vi skribas. Aŭtoroj aperas en siaj skribmanieroj. Ili ne estas pagataj. Nome subskribitaj artikoloj ne necese reprezentas la opinion de la asocio. Ĉiu parto povas esti republikigota kun klara fontindiko. La enhavo de la TTT eldono estas tute sama. Diskonigu kaj cirkuligu vian informilon plej eble!*